

Jean de La Fontaine,  
La cikad' kaj la for-  
mik'

*tradukita de Manfredo Ratis-  
lavo*

Sonis dum somer' kantad'  
De cikad'.  
Kiam venis la jarfin'  
Sen proviz' ĝi trovis sin;  
Ĉar ne estis ie de  
Muš' aŭ verm' pecet', pro ve'  
Kaj malsat' ĝi turnis sin  
Al Formik', la najbarin',  
Sin petante pri paner';  
Ĉar grandegis la mizer'.  
"Ĝis la nova kant-sezon'  
Iĝos ja de mi redon'","  
Juris ĝi, "kaj pagos mi  
Interezon ĝis Juni'!"  
La formiko, kiu vere  
Ne prundonon satis tre,  
Diris: "Mi ĝin donos ne!  
Kion faris vi somere?" -  
"La pasantojn per muzik'  
Mi ĝojigis ĝis aŭtun'."  
"Mi tre ĝojas, dancu nun!"  
Diris tiam la formik'.

...

Jean de La Fontaine,  
Cikado kaj formiko

*tradukita de Antoni Grabow-  
ski*

Kantis dum somer' sen fin'  
Cikadin'.  
Kiam frosta vento blovis  
Sen provizo ŝin ektrovis,  
Sen malgranda eĉ pecet'  
Da mušeto aŭ vermet';  
La malsato pelis ŝin  
Al najbara formikin'.  
Kaj ŝi petis kun insistis:  
"Donu grajnojn por ekzisto  
Ĝis la nova jar-sezon'.  
Mi vin pagos, laŭ ordon',  
En Aŭgust', pro best-honor',  
La procenton kun valor'."  
Ke ne pekas formikino  
Per pruntemo, estas vere;  
"Kion faris vi somere?"  
Diris ŝi al pruntulino.  
— "Tage, nokte al venantoj,  
Ne mallaŭdu – kantis mi."  
— "Kantis? – gaja jen meti'!  
Nun ekdancu post la kantoj!"

...

Jean de La Fontaine,  
La Cigale et la Fourmi

La cigale, ayant chanté  
Tout l'été,  
Se trouva fort dépourvue  
Quand la bise fut venue.  
Pas un seul petit morceau  
De mouche ou de vermisseau  
Elle alla crier famine  
Chez la fourmi sa voisine,  
La priant de lui prêter  
Quelque grain pour subsister  
Jusqu'à la saison nouvelle  
«Je vous paierai, lui dit-elle,  
Avant l'oût, foi d'animal,  
Intérêt et principal .»  
La fourmi n'est pas prêteuse ;  
C'est là son moindre défaut  
«Que faisiez-vous au temps chaud?  
Dit-elle à cette emprunteuse.  
Nuit et jour à tout venant  
Je chantais, ne vous déplaise.  
- Vous chantiez? j'en suis fort aise.  
Eh bien : dansez maintenant.»

...

*Traduko de la Franca poemo "La Cigale et la Fourmi" de JEAN DE LA FONTAINE (\*1621-07.08 – †1695-04.12) en Esperanton de MANFREDO RATIS-LAVO (Manfred Retzlaff, Stettiner Str. 16, D-59302 Oelde, Germanio, \*1938-11-04) en 1983.*

Arg-549-1105 (2010-07-09 23:08:07)

*Traduko de la Franca poemo "La Cigale et la Fourmi" de JEAN DE LA FONTAINE (\*1621-07.08 – †1695-04.12) en Esperanton de ANTONI GRABOWSKI (\*1857-06-11 – †1921-07-04).*

Arg-549-1108 (2014-03-16 17:39:47)

*Mi, Manfred Retzlaff, trovis tiun ĉi tradukon en [http://wwwbabelmatrix.org/works/frLa\\_Fontaine\\_Jean\\_de/La\\_cigale\\_et\\_la\\_fourmi/eo/](http://wwwbabelmatrix.org/works/frLa_Fontaine_Jean_de/La_cigale_et_la_fourmi/eo/) 5026-Cikado\_kaj\_formiko. Gi troviĝas ankaŭ en la retejo de la usona esperantisto Don Harlow <http://donh.best.vwh.net>. Pri la tradukinto vidu la vikipedion retejon [http://eo.wikipedia.org/wiki/Antoni\\_Grabowski](http://eo.wikipedia.org/wiki/Antoni_Grabowski). Vidu ankaŭ: [http://eo.wikisource.org/wiki/Cikado\\_kaj\\_formiko](http://eo.wikisource.org/wiki/Cikado_kaj_formiko).*

*Verkinto de tiu ĉi Franca poemo estas JEAN DE LA FONTAINE (\*1621-07.08 – †1695-04.12).*

Arg-549-1103 (2010-08-07 13:53:59)

*Mi, Manfred Retzlaff, kopiis tiun ĉi tekston el <http://www.lafontaine.net/lesFables/afficheFable.php?id=1>.*